

LA TRAGEDIO DE L'HOMO

En la literatura lingvo gravegan rolon ludas la fleksebleco kaj elasteco de Esperanto. Ĝi bonege adaptiĝas al la apartaj ecoj de la plej diversaj lingvoj, tiel ankaŭ al la hungara.

Rilate al la poezia stilo, tio multe helpas al tradukado fidela kiel laŭ la senco, tiel ankaŭ laŭ la formo. En E-o oni bonege ja povas traduki la diversajn ritmojn kaj rimojn. Nature la tradukado de poezio, precipe de la klasika poezio, postulas tre grandan lertecon, talenton.

Krom tio, la lingvo posedas multajn ecojn, kiuj altgrade taŭgigas ĝin kiel tradukilon. Tia tradukilo estas ekz. libera vortordo en propozicio, ĉar ĝi donas eblecon por pliriĉigo de senco enhavo kaj por la fidela formo, ritmo.

Fine pro la gramatika strukturo de la lingvo la tradukanto povas redoni per perfekta precizo la nuancojn kaj koncizojn de la originala teksto.

Kalocsay aplikis ĉi tiujn eblojn en la plej variaj formoj, maksimume kaj artgrade, en la dua tradukaĵo de La Tragedio eĉ pli bone ol en la unua. En la spegulo de la du tradukoj ni vidu lingvo- kaj stilevoluajn tendencojn en Esperanto.

1. VORTORDO

La vortordo en plumo de Kalocsay estas la plej grava ilo de la arta esprimo. Ĉe la komparado de la du tradukoj ankaŭ ĉi tie mi trovas bonegan okazon montri la evoluon de Esperanta stilo tra la evoluo de la tradukanto.

Mi pensas, ke sufiĉas menciigi kelkajn karakterizajn aspektojn — antaŭ la denombro:

- a. La elimino de la ĝena fonetika fortefiko (mi ja ≠ mia)
kaj al mi ja sufiĉas lok' -- kaj ja sufiĉas al mi lok'
egy talpalatnyi föld elég nekem
- b. Transformado de dismembrita frazo en frazon kun centra punkto de kvieto
Ĉu venis vi de supre aŭ de sube? -- Ĉu vi de supre venis
Alulról jössz-e hozzánk vagy felülről? aŭ de sube?
- c. Antaŭenmeto de la akcentata vorto
Ĝi ja bezonas ankaŭ senmortecon -- Ja ankaŭ senmortecon ĝi
A halhatatlanság is kellene bezonas
- ĉ. Elimino de adjektembaraso
Regula, monotona viv' enua -- Regula viv' de monotona enua
Az egyhangú, szabályos élet

Ekzemploj:

Mi sufiĉan saĝon havas por mi mem -- saĝon sufiĉan por mi mem mi havas.
Eszem elég van nekem önmagamnak
Ne havos eĉ bon-nomon vi post patro -- Post patro al vi eĉ bona nom' ne restas
Még jó nevet se hágy reád atyád
La homon jam preskaŭ ekfalantan ree levas? -- Ĉiam denove levas la falantan homon?
Mindannyiszor fölkelti újra?
Ĉu sekvu mi ekzemplon tiun bonan? -- Ĉu ni mem sekvu ĉi ekzemplon bonan?
Kövessük-e szintén példájukat?
Kaj kisoj ardu, ĉiam por mi pretaj -- Kaj kisoj al mi ardu, ĉiam pretaj
Ha csököd forró s mindig kész nekem
Verŝanta junon en maljunan vejnon -- En vejnon de oldulo verŝas junon
Mely ifjúságot önt az agg erébe
Ĉu vi en pli bonan rondon ne per mi venis? -- Ĉu ne dank' al mi vi venis pli altajn rondojn?
és nem általam jutál-e jobb társaságba?
Sur via alta bret' vi tiel juĝas -- Tiel de via alta ŝtup' vi juĝas
úgy ítélsz, ládd te is nagy polcodon
Nin laboro, la perfidulojn tie mort' atendas -- Nin laboro atendas tie, perfidulojn morto!
Munka vár ránk, s vész az árulókra

2. KONCIZIGO DE LA AMPLEKSO

Kaj el la komparado de la du tradukaĵoj, kaj el la deklaro de la tradukanto evidentiĝas tio, ke ĉe la dua tradukado la ĉefa celo de Kalocsay estis la koncizigo, kaj densigo, kaj per tio ankaŭ la kurtigo de la amplekso de la verko. Tiun celon li ne nur atingis, sed (uzante la eblojn de Esperanto) arte, alnivele superis.

Se mi rigardus nur la kurtigon atingitan en la amplekso, sufiĉus apelacii al la postrimarko de la tradukanto, kie li konstatas: *La nuna teksto estas pli konciza: ĝi estas malpli per 100 versoj ol la antaŭa, kaj nur per 40 versoj (1%) pli, ol la originalo. Tio ne estas sensignifa en verko, pri kies originalo tiel karakteriza estas la formo de la koncize esprimata penso.*

Laŭ mia opinio ne tio estas la ĉefa merito de la kurtigo, ke la dua tradukaĵo proksimiĝas al la longeco de la originala verko, sed tio, ke la tradukanto tiel ĝin sciis atingi, ke tiu kurtigo okazis sen la malutilo de la tuto.

Por prui tion, mi deziras ilustrii mian konstaton per kelkaj interrilataj tekstpartoj prenitaj el la sepa bildo. El ili mi detale analizas nur tri ekzemplojn.

Detala analizo 1.

	<i>Pardonu min, sed tiu ĉi monaĥo</i>	11		
	<i>Delonge estas mia kamarad'</i>	10		
	<i>Kaj ja ne abomenas mi tiaĵojn</i>	11		
Bocsáss meg, e barát rég cimborám	10	<i>Pardonu, min delonge ĉi monaĥo</i>	11	
S nem is utálok én az ily világot	11	<i>kompanas, kaj ne naŭzas min tiaĵoj</i>	11	

La silabnombro de la unua tradukaĵo estas 32, en la dua 22 (en la originalo 21). La kurtigo 10 silaboj, nome unu verso, tiel:

- per forlaso de TIU (tiu ĉi -- ĉi)	2 silaboj	
- per forlaso de vortetoj SED, JA	2 "	
- per verbigo uzante neologismon (estas mia kamarad' -- kompanas)	4 "	
- per vortŝanĝo (abomenas -- naŭzas)	2 "	sume 10

Detala analizo 2.

	<i>Hah, vi vendist' malbona kaj eĉ pli</i>	10		
	<i>Malbonaj aĉetantoj! Tíru glavon</i>	11		
	<i>Disbatu la foiron abomenan!</i>	11		
Hah, rossz árús, és mégrosszabb vevők!	10	<i>Ha, fivendist', pli fiaj aĉetantoj!</i>	11	
Vonj kardot és verd szét e ronda vásárt!	11	<i>Disbatu glave ĉi foiron naŭzan!</i>	11	

La silabonombro unue estas 32, sekve 22 (en la originalo 21) per vortkunmeto kaj vortŝanĝo:

<i>vendist' malbona -- fivendist'</i>	2 silaboj	
<i>malbonaj -- fiaj</i>	1 silabo	
<i>tíru glavon -- glave</i>	2 silaboj	
<i>abomenan -- naŭzan</i>	2 "	
kaj per forlaso de vortetoj VI, KAJ, EĈ	3 "	sume 10

Detala analizo 3.

	<i>Ho donu signon por ke mi ĝin fiksu</i>	11		
	<i>Sur mia kruc', ke, dum ĉi tiu vokas</i>	11		
	<i>Min al batal' honora, ĝi reportu</i>	11		
	<i>l' imagon de plej bela mia sonĝo</i>	11		
Adj nekem egy jelt, tűznöm e kereszthez	11	<i>Ho donu signon, kroĉi al ĉi kruco,</i>	11	
Hogy míg amaz tisztemben küzdeni hív,	11	<i>ke dum ĉi tiu vokas min batali</i>	11	
Legszebb álomnak hozza vissza képét	11	<i>tiu reportu ĉi plej belan sonĝon</i>	11	
	<i>por ke mi ĝin fiksu sur mia kruc' -- kroĉi al ĉi kruco</i>	4 silaboj		
	<i>al batal' honora -- min batali</i>	3 "		
	<i>l' imagon de plej bela mia sonĝo -- ĉi plej belan sonĝon</i>	5 "	12	
	kaj per vortŝanĝo (ĝi -- tiu)		sume	11

Katalin Nagy